# RATKAPTISTA KURIERO

## INFORMILO DE LA RATKAPTISTA BANDO

NUMERO 56 SEPTEMBRO 2015

Kontakt: Heinz W. Sprick hameln@esperanto.de www.esperanto.de/hameln Tel:0162/7536396

## Termine 2015/2016 mittwochs 19.00-21.00 Uhr

**Sumpfblume Hameln**

**2015: 9. Sep., 23. Sep., 30. Sep., 14. Okt., 28. Okt., 11. Nov., 25. Nov., 4. Dez. Weihnachtsfeier im Pfannekuchen; 9. Dez., Weihnachtspause,**
**2016: 13. Jan., 27. Jan., 10. Feb., 24. Feb., 9. Mrz., 23. Mrz., 30. Mrz., 13. Apr., 27. Apr., 11. Mai, 25. Mai, 8. Jun., 22. Jun., Sommerpause, 10. Aug., 24. Aug., 31. Aug., 14. Sep., 28. Sep., 12. Okt., 26. Okt., 9. Nov., 23. Nov., 30. Nov., 14. Dez., Weihnachtspause,**

*Das aktuelle Programm unter: www.esperanto.de/hameln*

## Einladung zum

# 12. "Rata★Rendevuo" in Bad Münder Sonntag, 18. Oktober 2015

**Die „Ratkaptista Bando" lädt ein nach Bad Münder.** Wir hoffen, mit vielen Esperanto-Freunden einen schönen Tag genießen zu können. Unser Telefon für Anmeldung und Fragen: **0162/7536396**.

**Das Programm:**

- ab 9.30 Uhr: Treffen für Frühankommer im **Eiscafé „Dolmen"**, Lange Str. 13-15, zum Kaffeetrinken und Plaudern
- 11.00 - 12.30 **Führung** durch die **Innenstadt** von Bad Münder und den **Kurpark mit Gradierwerk** mit dem **„Süntelgeist"**, Start am Eiscafe „Dolmen"
- anschließend ca. 12.40 Uhr: **Mittagessen** im **Ristorante-Pizzeria „Barese"**, Echternstr. 22, bitte Essen vorbestellen: http://ristorante-barese.de/speisekarte.html
- ca. 14.10: Fahrt mit PKWs nach **Bakede**, Mitfahrgelegenheit ist vorhanden





- 14.30-16.00 Uhr: **Besichtigung** des **Filmwelt-Centers**, die größte private **Star Trek-Sammlung**, in Bakede, Südstr. 2;
- anschließend ca. 16.10 Uhr: Kaffee und Torte im **Hofcafe „Freitags Hof“** in Bakede, Zum Wittkopfstein 1; dabei ist auch Gelegenheit, sich in der benachbarten **Kirche** die **Glaskunstausstellung** anzusehen;
- Ende ca. 17.30/18.00 Uhr

**Kosten**: Führung durch Innenstadt und Kurpark von Bad Münder und Besichtigung des „Star Trek“-Filmwelt Centers in Bakede: **10,00 €**;
Essen und Getränke (Eiscafé, Ristorante, Hofcafe) zahlt jeder selbst;
**Anmeldung und Überweisung des Beitrags** bitte unbedingt **bis 12. Oktober**: hameln@esperanto.de , Telefon: 0162 7536396, Doodle-Liste: http://doodle.com/poll/3yef9axq2pkzpf2u

Bitte den **Beitrag von 10,00 €** für die Führungen **bis 12. Oktober 2015 überweisen** auf das Konto der Esperanto-Gruppe Hameln bei der Sparkasse Weserbergland
IBAN: DE87254501100160118618
BIC: NOLADE21SWB
Kostenfreier Parkplatz: Ecke Wallstraße/Schulwall und Ecke Bahnhofstr./Lange Str.; Weg vom Bahnhof in die Innenstadt: 2,5 km, ca. 30 Min. Bitte angeben, wer wann vom Bahnhof abgeholt werden möchte, und bitte mitteilen, wann die Abfahrt ist.

Ich nehme teil:
O Eiscafe I O Stadtführung I O Mittagessen I O Star Trek Sammlung I O Hofcafe
Ich bestelle zum Mittag folgendes Gericht: Nr. ............................................................
http://ristorante-barese.de/speisekarte.html
O Ich möchte vom Bahnhof abgeholt werden; Ankunft: ................. Abfahrt: ..................
O Ich kann ............... Personen in meinem Auto mitnehmen (nach Bakede und zurück)

Einige Links: http://www.suentelgeist.de/ ; http://oestliches-weserbergland.de/ ; http://www.filmwelt-shop.com/ ; http://ristorante-barese.de/ ; http://www.bakede.de/hotcafe.html

## Invito al la

# 12-a “Rata★Rendevuo” en Bad Münder dimanĉon, la 18-an de oktobro

**La “Ratkaptista Bando” invitas vin al Bad Münder.** Ni esperas, ke ni povos ĝui belan tagon kun multaj Esperanto-amikoj. Nia telefono por la aliĝo kaj demandoj: **0162/7536396**.

**La programo:**
- ekde la 9-a 30: renkontiĝo por frualvenantoj en la **glaciaĵkafejo "Dolmen"**, Lange Str. 13-15, por trinki kafon kaj babili;
- 11-a - 12-a 30: **ĉiĉeronado** tra la **malnova urbocentro** de Bad Münder kaj la **kuracparko kun ejo por koncentri salakvon** kun la **fantomo de la Süntel-monto**; ekiro ĉe la glaciaĵkafejo „Dolmen“;
- poste ĉirkaŭ la 12-a 40: **tagmanĝo** en la **itala restoracio "Barese"**, Echternstr. 22;



bonvolu antaŭmendi la tagmanĝon: http://ristorante-barese.de/speisekarte.html
- ĉirkaŭ la 14-a 10: ekveturo per aŭtoj al Bakede, eblas kunveturi;
- 14-a 30 - 16.00: **rigardado** de la **Film-welt-Center**, la plej granda privata **Star Trek-kolektaĵo**, en Bakede, Südstr. 2;
- poste ĉirkaŭ la 16-a 10: kafo kaj torto en la **korta kafejo „Freitags Hof“** en Bakede, Zum Wittkopfstein 1; dume ankaŭ eblas viziti la **vitran artaĵan ekspozicion** en la najbara **preĝejo**;
- fino ĉirkaŭ la 17-a 30/18-a

**Kostoj**: ĉiĉeronado tra la malnova urbocentro kaj la kuracparko kaj la rigardado de la Star Trek-kolektaĵo: **10,00 €**;
manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (glaciaĵejo, restoracio, korta kafejo) ĉiu mem pagas;
**Aliĝo kaj ĝirado de la kotizo** bonvole nepre **ĝis la 12-a de oktobro**: hameln@esperanto.de , Telefon: 0162 7536396, Doodle-Liste: http://doodle.com/poll/3yef9axq2pkzpf2u

Bonvolu **ĝiri** la kotizon de **10,00 €** por la ĉiĉeronadoj **ĝis la 12-a de oktobro 2015** al la konto de la Esperano-Gruppe Hameln ĉe la Sparkasse Weserbergland,
IBAN: DE87254501100160118618
BIC: NOLADE21SWB
Senkosta parkejo por aŭtoj: angulo Wallstraße/Schulwall kaj angulo Bahnhofstr./Lange Str.; vojo de la stacidomo ĝis la urbocentro: 2,5 km, ĉirkaŭ 30 min. Bonvolu mencii kiu kiam ŝatas esti ŝoforita de la stacidomo, kaj bonvolu diri, je kiu horo vi forveturos.

Mi partoprenas:
O glaciaĵkafejo I O urboĉiĉeronado I O tagmanĝo I O Star Trek kolektaĵo I O korta kafejo
Mi antaŭmendas jenan tagmanĝon: Nr. ..........:::::::::::::.....................................................
http://ristorante-barese.de/speisekarte.html
O Mi ŝatas esti ŝoforata de la stacidomo enurben; alveno: ............. forveturo: ................
O Mi povas kunpreni ........ personojn en mia aŭto (al Bakede kaj reen)
Kelkaj ligoj: http://www.suentelgeist.de/ ; http://oestliches-weserbergland.de/ ; http://www.filmwelt-shop.com/ ; http://ristorante-barese.de/ ; http://www.bakede.de/hotcafe.html



# Esperanto-Veranstaltungskalender:
# siehe auch: http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm

2015: **4.-6.9. Esp.-Kurswochenende in Sundern;** 6.9. Lernfest in Saarbrücken; 9.9. Sommerfest auf dem Esperanto-Platz in Berlin-Neukölln; 19.9. Oktoberfest-Treffen in München; 25.-27.9. 70-a Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo in Homburg/ Saar; 25.-27.9. 8-a Svisa Familia kaj Feria Esperanto-Renkontiĝo, SFERO en Ĉaledo Bel-Oseau en La Lécherette, CH; 25.-27.9. 31-aj ARtaj KONfrontoj en ESperanto "ARKONES" en Poznań, PL; 26.-27.9. Inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio en Svitavy, CZ; 30.9.-4.10. TORPEDo 10 in Herzberg; **1.-4.10. 15-a KoKoLoRES - Kafoklaĉo kaj Ludoj dum REnkontiĝo Semajnfina) in Schwerte;** 1.-4.10. La 4-a Internacia Esperanto-Lernejo en kastelo en kastelo Bartošovice, CZ; **2.10. Esperanta kantokonkurso en la kulturbutiko St. Georg en Hamburg;** 9.-11.10. 18a Esperanto-





Konferenco de Alp-Adrio en Opatija, KR; 16.-18.10. 8-a BIERo (Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo) en Nová Paka, CZ; 16.-18.10. 37-a BAVELO-Seminario in Pforzheim; **18.10. 12. Rata Rendevuo in Bad Münder; 18.-23.10. EMA Herbstwandertage an der Ahr;** 19.-25.10. 42-a lingva seminario en Skokovy, CZ; 23.10.-1.11. AMO AŬTUNE (Aktivula MaturigO en AŬtuna TUmulta NEsto) en kastelo Grezijlono. FR; 24.-31.10. Kijiva Esperanto-semajno - en Kijiv, UK; 30.10.-1.11. KKPS - Klaĉ-Kultura Postsomera Semajnfino en Heerlen, NL; 30.10.-1.11. 37a Kataluna Kongreso de Esperanto en Mataró, ES; 1.-6.11. Mara semajno en Ostendo, BE; 14.-15.11. 27-a Eŭropa Esperanto-Rendevuo en Stella-Plage, FR; 18.-22.11. 6-a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio en Havano, Kubo; 28.11. 43-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, NL; **11.-13.12. Studsesio und Zamenhoffest in Herzberg**; 27.12.-3.1. Junulara Esperanto-Semajno **JES**-2015/16 tutsemajna kaj eksterordinara novjara renkontiĝo por junuloj de Eŭropo en Eger, HU; 27.12.-3.1. 14-a Novjara Renkontiĝo (**NR**) in Saarbrücken; 28.12.-4.1. Silvestra renkontiĝo **LUMINESK'** in Nideggen (zwischen Köln und Aachen); 28.12.-2.1. **SANO** - Sano-Alternativo-NOvjaro - en Herzberg am Harz;





2016: 26.2.-8.3. Dua Speciala Ekskurso 2016 kun AMO Seminario en Katmandu, Nepalo; 23.-28.3. Trilanda Kongreso en Bandung, Indonezio. Trilanda kongreso inter Aŭstralio, Indonezio kaj Nov-Zelando; 25.3.-1.4. Printempa Semajno Internacia, PSI in Bad Hersfeld; 1.-4.4. 9-a Mezorienta Esperanto-Kunveno en Ürgüp, Kapadocio, Turkio; 14.-16.4. Israela Kongreso en Jafo, Israelo; 20.-24.4. Korusa renkonto de Interkant en Baugé, FR; 29.4.-3.5. Mirinda Lviv en Lviv, UA; **4.-8.5. BARO in Bad Mün-**

**der; 13.-16.5. 93. Deutscher Esperanto-Kongress in München;** 26.6.-10.7. Elfriden 6 - Sorparbo Internacia Spelmanslag en Lövberget, Björbo, SE, poste ni kune veturos al Nås, Bingsjö kaj Lesjöfors. Popolmuzikaj grupiĝo kaj kunvenoj; 2.-10.7. 52aj Baltiaj Esperanto-Tagoj in Birštonas, LT; 5.-10.7. Kultura Esperanto-Festivalo KEF 10-20-30 en Lesjöfors, SE; 12.-20.7. Krimeaj Esperanto-Tagoj, KET - en Jalta, Krimeo kun invito al eksterlandanoj; **16.-23.7. 72-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) - en Wrocław, PL; 23.-30.7. Universala Kongreso de Esperanto, UK-101 en Nitra, Slovakio;** 31.7.-5.8. 8-a boatado sur la rivero Kupa en Karlovac, Sisak, Petrinja, Kroatio; 13.-20.8. 6-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE-6) - en la urbo Rumonge, Burundi;




EN AMBAŬ DIREKTOJ:

1 – Konigi, transdoni informe.
2 – Publika elokventa parolanto.
3 – Mano de infano.
4 – Parto de ina seksorgano.
5 – Signo por muzika tono.
6 – Perpieda moviĝo.
7 – Nomo de la litero K.
8 – Infinitiva finaĵo.




EN AMBAŬ DIREKTOJ:

1 – Vortspeco indikanta nombron.
2 – Loĝanto de Nord-Ameriko.
3 – Instigo al ago.
4 – Fari, ke io estu en io.
5 – Veki admiron.
6 – Membro.
7 – Nomo de la litero L.
8 – Substantiva finaĵo.



EN AMBAŬ DIREKTOJ:

1 – Rilata al unu el la kristanaj religioj.
2 – Estrino de monaĥinejo.
3 – Materialo por fumado.
4 – Ĉefurbo de Kanado.
5 – Loko, kie likas objekto.
6 – Femalo.
7 – Nomo de la litero K.
8 – Mallongigo por ampero.



EN AMBAŬ DIREKTOJ:

1 – Produktas, estigas.
2 – Tro ŝpareme.
3 – Perforte forprenos.
4 – Delikata odoro.
5 – Egalaj numeraloj.



**92-a Germana Esperanto-Kongreso en Hameleno**

Sukcese okazis la 92-a Germana Esperanto-Kongreso en Hamelene. Kelkaj artikoloj jam aperis pri ĝi. Jen kiel ekzemplo artikolo de Markus Beyer, originale skribita por kaj aperis en la gazeto „Esperantisto Slovaka“:



Dum la Pentekosta semajnfino, de la 22-a ĝis la 25-a de Marto, kunvenis ĉirkaŭ 170 Esperantistoj kadre de la 92-a GEK en la urbo Hameleno (Hameln). Spite de la ĉefe nacia karaktero de la ĉefkunveno de la Germana Esperanto-Asocio (GEA), la etoso estis tre internacia ĉar inter la aliĝintoj troviĝis 20 personoj el 9 landoj ekster Germanio, i.a. el Slovakio, Ĉeĥio, Belgio, Litovio, kaj eĉ el Kubo kaj Koreujo.



La urbo estas tutmonde famkonata ĉefe pro la legendo de la „Ratkaptisto de Hameleno“, kiu en la 13-a jc. liberigis la urbon per sia flutludado de rata plago kaj post la rifuzo pagi al li la promesitan monsumon punis la urbanojn kaj forlogis ĉiujn infanojn. Hameleno intertempe fariĝis la kultura centro de la Vezermontaro kaj nun allogas turistojn el la tuta mondo.



Dank’ al la laboro kaj propagando de la LKK la kongreso trovis grandan subtenon en la urbo kaj la regiono. Patrono estis la ĉefministro de Malsupra Saksio, Stephan Weil kaj salutvortojn sendis ankaŭ de la subdistriktestro, Tjark Bartels kaj la ĉefurbestro de la urbo Hameleno, Claudio Griese, kiu en aparta oficiala akceptado bonvenigis 50 partoprenantojn de GEK (ĉefe kunhelpantojn, estraranojn de GEA kaj la eksterlandajn gastojn). Mona subteno venis i.a. de la loka banko „Sparkasse Weserbergland“.





La kongrescentro troviĝis en metilernejo, nur kelkajn paŝojn for de la historia urbocentro kun siaj multaj vidindaĵoj. Tiel ankaŭ la diversaj hoteloj kaj la amasloĝejo, kiu troviĝis en sporthalo, estis atingeblaj en nur kelkaj minutoj.



La programo estis treege riĉa. Jam la solena malfermo, kie denove paroladis la ĉefurbestro kaj la subdistriktestro estis muzike akompanata de la duopo Ĵele. Entute la kongreso estis tre muzika. Koncertis la franca kantisto JoMo, la litovia grupo Asorti, kaj

ankaŭ Kaŝi – vernome Carsten Schnathorst kiu furoris jam dum la pasintaj du SES-oj en Slovakio. Aparte okazis etaj spontanaj koncertoj de muzikemaj partoprenantoj, ekz. gitara muziko el Kubo kaj harpludado pere de junulino el Germanio. La kroma arta programo konsistis el Esperanta pupteatraĵo, kaj teatraĵoj pri la Ratkaptisto. Dum la tago okazis multaj diverstemaj prelegoj pri diversaj landoj, instrumetodoj kaj movadaj temoj kaj historio.





Ekzemple Stano Marček i.a. prelegis pri la fratoj Grimm, H.A. Andersen, kaj pri direktmetoda instruado de Esperanto. Neforigebla parto de nacia kongreso kompreneble estas la jaraj kunsidoj de la diversaj asocioj. La membrokunsido de GEA ĉi-jare daŭris kelkajn horojn pli longe ol estis antaŭe planita.



La ĉefparto de la dimanĉa programo estis ekskursoj. Jam ĉe alliĝo elekteblis diversaj celoj: Vitroblovistejo, la malnova urbocentro, la kastelo Hämelschenburg aŭ la famkonata bankuracloko Bad Pyrmont.

Dimanĉon okazis publika ekumena diservo multlingva sur



la teraso de la historia „Hochzeitshaus“ („nupta domo“). Inter la aliaj lingvoj, Esperanto tamen trovis la ĉefan lokon apud la Germana. La Esperantajn partojn de la diservo legis Pavol Petrík (SK) kaj Petr Chrdle (CZ). Por la Pentekosta Lundo estis organizita alia ekumena diservo en



preĝejo tuj apud la kongresejo, ĉi-foje komplete en Esperanto, kiun festis Pastorino Corinna Schweiger kaj Pastro Albrecht Kronenberger.



La kroman Esperantan etoson estigis servoj tipaj por Esperantaj kunvenoj. Nome la drinkejo (en germanaj kongresoj nomata „knajpo“) kaj la gufujo en kiuj okazis la antaŭe menciitaj spontanaj koncertoj. La libroservon ĉi-jare prizorgis eĉ tri librovendistoj: D-ro Wolfgang Schwanzer por la libroservo de GEA kaj aldone, Stano Marček kaj Petr Chrdle.



Resume la kongreso povas esti rigardata kiel granda sukceso kaj jam aŭdiĝis voĉoj, ke la organizantoj de la venontjara GEK en Munkeno, Bavario alfrontas grandan defion organizi kongreson je samalta nivelo.

# 92a Germana Esperanto-Kongreso
## Hameln, 22a - 25a de majo 2015
oficiala foto (de Sebastian Kirf)

